

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-RO 519

JANUARO 1949

Se interesa romano plaĉas al vi, nepre legu la libron

MORTO DE TRAJNO

de FREEMAN WILLS CROFTS

El la angla lingvo tradukis

MASON STUTTARD

256 paĝoj. Bindita 9 ŝilingoj, afranko 6p.

“Morto de trajno”, stranga titolo por libro, ĉar la personigo de objekto estas jam per si mem io nekutima kaj des pli de objekto kiel trajno. Rakonti al vi pri la enhavo de ĉi tiu libro ni ne faros. Ĝi estas streĉa kaj . . . implikita. Sufiĉu, ke temas pri spionado de Germanoj en Anglujo en la dua mondmilito. Kompreneble estas Scotland Yard, kiu finfine savas la tutan aferon, sed antaŭ tio okazas la leganto ĝuis ĉiujn friponaĵojn kaj lertaĵojn, kiuj estas propraj al detektiv-romano. “Morto de trajno” estas libro, kiun oni finlegos en unu fojo.

Kiu ŝatas detektiv-romanojn aĉetu tiun ĉi libron, kaj ankaŭ kiu ne kutimas legi tiajn librojn, legu “Morto de trajno”. Oni ne bedaŭros la uzitan tempon !

Laborista Esperantisto



Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe ĝia agentejo en via lando aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

S-ro Stanislav Bürger, Družstevní 987, Ĉ. Budejovice, Ĉeĥoslovakujo, interesiĝas pri sporto kaj gazetoj, kaj interŝanĝas poŝtkartojn.

S-ro Oldřich Čížek, Doudlebská 489, Ĉ. Budejovice, Ĉeĥoslovakujo, interŝanĝas poŝtkartojn.

S-ro Oskar Hruby, Mladé 144 apud Ĉ. Budejovice, Ĉeĥoslovakujo, interŝanĝas poŝtkarton.

S-ro Josef Ploss, Skuherského 63, Ĉ. Budejovice, Ĉeĥoslovakujo, interŝanĝas poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kaj korespondas pri ĉiuj temoj.

S-ro Vladimír Michl, studento, Dobré 9 apud Dobruška, Ĉeĥoslovakujo, interesiĝas pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝas poŝtmarkojn kaj alie. Ĉiam certe respondos.

Kolektantoj! Ni povas sendi vin unuatagkovertojn de ĉiuj eldonotaj danaj, finnaj, islandaj, norvegaj, svedaj poŝtmarkoj. Ĉu vi povas sendi al ni vialandajn? Skribu al I.A.P.K., Box 5085, Göteborg 5, Svedujo.

Abelbredistoj! Deziras raportojn pri abelbredado por sveda fakgazeto Gunnar Åsemyr, Höviksnäs, Svedujo.

Juna studento deziras korespondi pri geografio, etnologio, historio, literaturo. Walther Mügge, Lenglern 124 über Göttingen, Brita Zono, Germanujo.

Ni estas junaj Esperantistoj, kiuj deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Respondu al: Sigvard Svensson, Korpogatan 5, Vetlanda; Gösta Hansson, Sandåkra, Bäckseida; Erik Karlsson, Industrigatan 39, Vetlanda; Svedujo.

"Originala Verkaro-n" de Zamenhof deziras aĉeti aŭ pruntepreni S-ro Apcher, Lycée, Meknes, Maroko.

Deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj landoj: Karlo Schmauder, Im Hag 6, Stuttgart-Untertürkheim, Germanujo, USA Zono. Aŭfranku filatele.

Fervoja metiestro deziras korespondi pri ĉiuj temoj kun Usonano, prefere teknikisto. Lefevre, 67 rue F. Plomb, Epernay (Marne), Francujo.

Mi deziras korespondi kun angla samideano. Mi estas komencanto sed nepre respondos. S-ro Ernesto Bernardi Neto, Rue Verqueiro 3.229, São Paulo, Brazilo.

Elkoran dankon al ĉiuj amikoj tutmondaj, kiuj gratulis pro mia 80a naskiĝtago. Pro amaso da bondeziroj ricevitaj (pli ol cent) mi ne povas individue respondi. August Rehse, Hanovero.

Du polaj pilotoj 21-jaraj volus korespondi kun samideaninoj eksterlandaj. Skribu al S-ro Baŭsias Miroslaw, Stefana Jaracza 56 m. 3, Łódź, Pollando.

Libro por korespondemuloj senpage. Legu jarlibron 1949, paĝon?

Poŝtkartkunveno. Ĉiu kiu sendos al ni ilustritan poŝtkarton ricevos de ni ilustritan poŝtkarton de nia urbo. Junulargrupo "La Kukolo", Koekkoekstr. 22, Hilversum, Nederlando.

Virino bezonata, prefere inter 24 kaj 40-jaraĝa kaj scianta iom da angla lingvo, kiel domservistino en Rickmansworth, Anglujo. Veturo pagota, kontentiga salajro, komforta hejmo. Sendu foton kaj detalojn, unue al Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo.

Letervespero. Por festi la renaskiĝon de Esperanto-movado kaj jubileon de 65-jara pioniro Chaler, estos letervespero la 20an de Januaro 1949. Poŝtkartoj kaj leteroj danke respondotaj: Esperanta fako, Sd. Coral Juventual Tarrasense, San Francisco 52, Tarrasa, Hispanujo.

F-ino Geneviève Perrier, "Petit-Moulin", Montendre (Charente Maritime), Francujo dankas tutkore siajn 150 gesamideanojn kaj al ĉiuj deziras feliĉajn Kristnaskfestojn kaj Novan Jaron. Ŝi informas ilin ke nun ŝi respondas nur al tiuj kiuj sendas respondkuponon, aĉetebajn en ĉiuj poŝtoŭficejoj.

Memoru Olympiadon de Finnlando 1952! Mendu kolorilustritajn poŝtkartojn pri Finnlando kaj Finna sporto. Valuto ne bezonata! Informpetu per adreso: Yrjö Riekkinen, Pattijoki, Finnlando.

Al ĉiu, kiu sendos al mi 50 bonajn poŝtmarkojn uzitajn de sia lando kaj kolonioj mi tuj sendos la saman kvanton el Ĉeĥoslovakujo. Harry H. Khel, Pivonkova 2124, Praha XIII/75, Ĉeĥoslovakujo.

Poŝtmarkoj. Mi estas filatelisto kaj telegrafisto 20-jara S-ro Sigeru Kimura (Nanpuusoo), Asagaja 4-937, Suginami-ku, Tokio, Japanujo.

Tutmondaj filatelistoj! Se vi deziras posedi la plej belajn pm. de ĉiuj serioj vi povos ricevi la perlon de mia kolekto: ĝi valoras 500,000 levojn. Kontraŭ pm. mi deziras ricevi la preparaĵojn Natriev benzoat kaj silicieva acidaĵo. Skribu al adreso: Georgi Atanasov, str. Werila 1, Ŝumen, Bulgarujo.

P. Balkanyi, ĉefdel. de UEA, Hungarujo, sciigas, ke nuna adreso estas: Budapest 54, MNB/FO. Pro multaj laboroj ne havas tempon korespondi kaj sendas plej korajn bondezirojn por nova jaro.

KUNFANDIĜO !

ek de Januaro 1949

Franca Esperantisto—Kompreni

fariĝas komuna organo de la
Esperantista franca penso.

Petu specimenon kontraŭ 1 rpk, Jarabono 12 rpk. El eksterlando ni akceptas abonojn dum la tuta jaro. Redakcio-Administracio: 34 Rue de Chabrol, Paris 10, Francujo.

Raz-klingsoj

Elektraj raz-aparatoj

Svisa fabrikanto ofertas en plej bona, t.n. horloĝist-kvalito.

Raz-klingsojn

diversajn tipojn, el sveda ŝtalo, ankaŭ ne rustiĝantan, 0.06-0.13 mm.

Elektrajn raz-aparatojn

110/220 voltoj, alterna fluo, 50 periodoj: tre solida, simpla kaj pruvita konstruo, je interesaj prezoj kaj kondiĉoj.

Samideanoj, kiuj sukcesas interesi importistojn kaj fakulojn estos rekompencataj se aĉeto efektiviĝas.

Oni skribu al

S-ro P. Enz, Stüssistr. 19, Zürich 6, Svislando

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

42a JARA Januaro 1949

N-ro 519 (I)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO

Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj
estas permesataj, kondiĉe ke oni
citu la fonton. Por bibliografia
celo oni sendu periodaĵon en kiu
aperas represo el ESPERANTO,
al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £5 : ½ paĝo 50 ŝil.
¼ paĝo 25 ŝil. : ¼ paĝo 12.5 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

NOVJARA ALVOKO

de La Prezidanto de U.E.A.

En 1948 U.E.A. kiel organizaĵo laboris kontentige. Ĝia komitato dum siaj kunsidoj traktis esencajn problemojn kaj evitis bagatelojn. Interalie la komitato diskutis la metodojn por oficialigi Esperanton. Oni venis al la konkludo, ke ni komencu per sistema penado en ĉiuj landoj havigi oficialigon kaj monsubvencion de la ŝtato je okazigo de esperantokursoj por instruistoj. Tiu decido estas transdonita al ĉiuj landaj asocioj, kiuj certe ĝuste nun traktas la problemon, ni esperu kun bona rezulto. Dum la kongreso en Bournemouth ni aŭdos la raportojn de la diversaj landoj.

Tiu ideo, ke la ŝtato pagu la kostojn por esperantokursoj, efektive montras la vojon al novaj perspektivoj. Temas pri la intenco havigi helpon en granda skalo al la esperantomovado per ne-esperantistaj institucioj.

Ni esperantistoj devas konfesi, ke ni per nia propra forto ne havos grandan ŝancon konkeri la mondon en antaŭvidebla tempo. Sed se ni povus ligi al ni aliajn gravajn organizaĵojn, tiuj helpus nin venki.

Tiel oni faris en kelkaj landoj kun bona rezulto. Mi menciuj nur la jenajn faktojn : En Svedlando la esperantistoj sukcesis akiri monsubvencion de la ŝtato por aranĝi instruistkursojn. Tiel okazis dum 5 jaroj. Kaj dum aliaj 10 jaroj la granda organizaĵo Laborista Kleriga Asocio pagis la kostojn. La koresponda esperantokurso, unue eldonita de Sveda Esperanto-Federacio, nun estas eldonita de la potenca Koopera korespondinstituto, kiu kapablas fari por la kurso tian reklamon, kian la esperantistoj tute ne povus pagi. En Norvegujo la nova koresponda kurso estas eldonita de la Norvega Instruista Asocio kunlabore kun la Norvega Esperantista Ligo. Mi prenis tiujn ekzemplojn el la Nordo, ĉar ili estas al mi plej proksimaj, sed mi bone konscias, ke oni ankaŭ aliloke komencis sammaniere. Kaj ĉiuj tiuj ekzemploj donis tiajn bonajn rezultojn, ke ili meritas ĉies atenton.

Multfoje vi aŭdis pri la graveco fondi fakasociojn en la kadro de la esperantomovado : instruistan, ĵurnalistan, sciencan, tramistan k.t.p. En tiaj fakasocioj oni kolektas esperantistajn ĉefrolulojn por tiu fako. Sed kvankam tiuj fakaj asocioj estas ne nur gravaj sed eĉ necesaj, ili formas nur la unuan ŝtupon, aŭ eble la duan. Sed la lasta ŝtupo devas montri la jenon : La fondadon de esperantosekcioj en la kadro de la fakaj sindikatoj. En tiuj fakaj sindikatoj la esperantistoj povos per praktika aplikado de Esperanto montri al la aliaj samfakanoj, ke nia lingvo prezentas nekontesteblajn avantaĝojn. Mi eĉ volus proponi, ke oni nomi tiujn sekciojn ne Esperantosekcio, sed Internacia Sekcio. La esperantistoj zorgu pri tio, ke la uzata lingvo estas Esperanto !

La esenco de mia novjara alvoko estas : Ni forlasu la izoladon ! Ni serĉu la malamikan aŭ indiferentan publikon en ĝia kaĝo, t.e. en la diversaj ne-esperantistaj asocioj. Mi scias, ke mi tiel postulas de vi duoblan laboron : nome laboron kaj en la esperantogrupo kaj en la faka asocio. Sed la rezulto estos via rekompenco !

Mi deziras al vi Bonan novan jaron kaj Bonan sukceson en via laboro !

E. Malmgren.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Internacia Federacio Esperanta Fervojista okazigos sian unuan kongreson en Aarhus, Danlando la 22-27-an de Majo 1949.

I.F.E.F. estis fondata en Aŭgusto pasintjare en Amsterdam de 11 landaj fervojistaj rondoj kaj ĝi havas sian sidejon en tiu urbo. Ĝia celo estas, disvastigi la konon pri Esperanto al la tutmonda fervojistaro, helpi la membrojn kontakti kun eksterlandaj kolegoj, eldoni bultenon ĉiumonate, aranĝi ĉiujare en Majo sian kongreson. Koncerne politikon kaj religion ĝi estas neŭtrala.

Por ricevi ĉiujn informojn pri la kongreso oni sin turnu al: Johs. Christoffersen, Hallssti 43, AARHUS, Danlando.

* * *

Inter la diversnaciaj rifuĝintoj en Germanujo oni tre forte propagandas kaj instruas naciajn lingvojn, precipe tiujn kiujn verŝajne alprenos la rifuĝintoj en sia eventuala nova lando. Fronte al tiu lingva diverso la rifuĝintoj-Esperantistoj antaŭenpuŝas Esperanton kiel solvon de la lingva kaoso kaj multaj grupoj ekzistas en diversaj partoj. Ni atentigas pri la geskolta grupo en Weyarn, kiu klopodas varbi la junulojn por nia ideo.



La geskolta grupo de rifuĝintoj.

La 26-an de Septembro okazis la Dua Katolika Esperanto-Tago en Romo. Responde al salut-telegramoj venis respondoj de Lia S.M. la Papo, kiu krom bondeziroj komunikis sian benon, de la Ministro pri Instruado kaj la Urbestro de Romo.

Pastro Prof. Carolfi celebris la S. Meson en la kripto de la Baziliko de S. Antono kaj Esperante predikis el la Evangelio. S-ro Prof. Ruggiero parolis pri la kristana karito necesega por la fratiĝo de la popoloj kaj pri la helpo de Esperanto al tiu celo. Prof. Filippi, pioniro de la itala Esperanto-movado, parolis pri *Mia vivo kaj la instruado de Esperanto*.

En la posttagmezo Prof. Carolfi raportis pri la U.K. en Malmö kaj Pastro Marcello Scartabello franciskano, rektoro de la Baziliko de S-ta Antono, parolis pri *Franciskanoj kaj Esperanto*. Prof. Crosetto faris proponon, ke okazu Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj en Romo dum 1950 kaj pri tio oni decidis starigi komitaton kiu prizorgu la aferon. Prof. V. Musella, blindulo, direktis sian parolon al la instruistoj, montrante kiel Esperanto estas tre taŭga helpilo en la lernado de aliaj lingvoj. La kunveno finiĝis per kantado de la nova himno de la Katolikaj Esperantistoj.

* * *

La 31-an de Oktobro kaj 1-an de Novembro okazis en Varsovio la 3-a postmilita kaj 12-a laŭvica Pollanda Esperantista Kongreso. La kongreso okazis en la bele ornamita salono de la Centra Kooperativa Unuiĝo, kun partopreno de proksimume 200 delegitoj inter kiuj troviĝis granda nombro de studenta kaj lernanta junularo.

Kongresprezidanto estis Prof. Toczyski el Gdynia. Inter saluttelegramoj troviĝis tiuj de S-ro Malmgren, prezidanto de U.E.A., rektoro de Lodza Universitato Prof. Kotarbinski, de eminenta pola poeto Julian Tuwim, kiu esprimis esperon pri baldaŭa efektivigo de la revoj de la Esperantistoj, kaj de pluraj Esperantistaj instancoj.

Prof. Mieczyslaw Sygnarski prelegis pri *Esperanto kiel faktoro de internacia kulturo kaj paco*. D-ro A. Czubryński prelegis pri *Esperanto en lernejoj, UNESCO kaj UNO*.

En la kadro de la kongreso okazis la ĉiujara kunveno de la filiaj delegitoj, en kiu estis traktata la administraj aferoj de la pola organizaĵo. Okazis krome speciala junulara kunsido en kiu oni decidis fondi junularsekcion.

Sur la tombojn de D-ro Zamenhof kaj poeto Anton Grabowski la kongresanoj metis florkronojn je memoro, kaj solene parolis S-ro Sakowicz Ĉefdelegito de U.E.A., kaj Prof. Toczyski.

En la Lernejo de Minado en Rolla, Missouri, Usono, oni fondis oficialan Esperanto-sekcion, kiu faras multe da propagando en tiu loko, precipe en la sfero de radio. Jam komenciĝis ĉiusemajna serio de lecionoj pri Esperanto.

Oni atentigas nin pri tio, ke multa konfuzo estas kaŭzata en la poŝta servo ĉar multaj korespondantoj kutime mallongigas la nomon de la ŝtato Missouri: *Miss.* Tio estas eraro. Missouri estas difinita per *Mo.* Se oni uzas *Miss.* la korespondaĵo iras en ŝtaton Misissippi!

Zamenhofa memorŝtono en Jelenia Góra, Pollando

Post longaj preparaj laboroj la gesamideanoj en Jelenia Góra sukcesis akiri monrimedojn kaj oficialan permeson por la starigo de memorŝtono honore al D-ro Zamenhof. La oficiala inaŭguro okazis la 3-an de Oktobro 1948. Nomo de la sekcio *Cervamont* parolis ĝiaj prezidanto, prof. Stefan Gôrka kaj sekretario Jakob Garbar. Pro U.E.A. parolis la ĉefdelegito R. Sakowicz kaj pro la grupo en Wroclaw s-ano Misiurewicz. Ĉeestis la solenon ankaŭ la nepo de la Majstro, la juna Ludoviko Zamenhof.

Landa Kongreso 1949 en Aŭstrujo

La Aŭstra Esperanto-Kongreso por 1949 okazos en Graz 3-7 Junion. La protekton transprenis landestro de Stirio, S-ro Krainer, kaj la honoran prezidantecon la urbestro de Graz, S-ro prof. Speck. Prezidanto de la L.K.K. estos Prof. Hainschegg. S-ro J. Eder, grupestro de la societo *Unueco* en Graz, estos afergvidanto de la L.K.K.

Akademio de Esperanto

Per *Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto—N-ro 16* la nomita instanco daŭrigas la serion antaŭe nomitan *Oficialaj Sciigoj de la Akademio*. En ĝi oni parolas pri la reorganizo de la lingvaj institucioj (iamaj Lingva Komitato kaj la Akademio) kaj faras komentarion pri la *Statuto de la Akademio de Esperanto*, kiun U.E.A. presigis en la dua parto de sia Jarlibro 1948. La adreso de la Akademio estas: Oostduinlaan 32, Hago, Nederlando, al kiu oni devas sin turni pri ĉiuj aferoj rilatantaj al la Akademio.

La greka—internacia lingvo!

En la monato Oktobro (ministro Marshall tiam vizitis Grekujon) en iu kunsido de UNO greka delegito proponis la enkondukon de la greka lingvo kiel mondlingvo. Tuj poste en *Nieuw Utrechts Dagblad* aperis sekvanta artikolo:

Atentu, ministro Marshall! Ne estas facile paroli greke! Haha, vi intencas lerni la grekan lingvon? Tio estas ege facila—la grekoj diras. Kaj ankaŭ utila precipe se vi deziras skribi al junulino aŭ al diplomato, aŭ se vi volas disputi pri filozofio aŭ mendi pomojn.

Tamen bonvolu atenti kelkajn bagatelojn—ili diras—se vi ne ŝatas, ke oni miskomprenos vin rilate aferojn kiel ekzemple viajn ŝuojn kaj vian ĉiutagan panon. Se vi petas panon, diru *psomit*; tamen skribante pri ĝi nomu ĝin *artost*. Se vi skribas letereton al via ŝuisto, viaj ŝuoj nomiĝas *ypomidama*; se vi telefonas al li, *papoetsia*. Nur necesas, ke oni sciu tion.

Multaj homoj en Ateno (ankaŭ fremduloj) flue parolas greke, sed ne kapablas deĉifri superlinion de artikolo en ĵurnalo. Aliaj povas legi la novaĵojn (aŭ diversaĵojn) sed ili ne funde komprenas la sencon de la ĉefartikoloj. Sufiĉe da scienculoj komprenas Homeron tamen ne povas peti glason da akvo!

La ordinara homo parolas sian propran lingvon, intermiksitan kun multe da turkaj kaj italaj vortoj. Li scipovas nek legi nek skribi kaj neniam aŭdis pri gramatiko. Politikisto, kiu avidas lian *voĉon*, scias kiel paroli al li, kaj se vi deziras mem aĉeti viajn pomojn, ankaŭ vi devos lerni tion.


La bombasta oficiala lingvo, la plej uzata skriblingvo, multe konservis da *antikvaĵoj* kaj ĝi ne estus fremda al Sokrato kaj Plato. Ĝi estas uzata por ŝtataj dokumentoj, por sciencaj disertaĵoj kaj por la ĉefartikoloj en la gazetoj. Por la cetera parto de ĵurnalo oni uzas la pli vivantan lingvon, kiun kutimas paroli la homoj de la ĉefa klaso kaj la mezklasanoj.

Estas eble, ke nun vi pensas: la modern-greka lingvo enhavas tiom da specoj kaj nuancoj, ke mi ne sukcesos elsavi min el tiaj malfacilaĵoj. Do mi elektos la klasikan lingvon. Ho ve! tie la samaj malfacilaĵoj atendas vin. Povas esti, ke vi kun granda kontentiĝo bonege kapablas legi la mitologiajn historiojn de Homero, verkitajn en la dorika dialekto, kaj tamen neniel komprenas la historiajn verkojn de Herodoto, verkitan ionik-lingve. Eble vi kapablas studi la filozofion de Plato aŭ ĝui la komediojn de Aristofano, kiuj uzis la atenan dialekton. Tamen tio ne inkluzivas la eblon frandi la belecon de la lirikaj poemoj de Sapfo, kiuj estas verkitaj aeolik-lingve.

Ŝajnas, ke nur tio estas certa: se vi volas ekinterparoli kun la antikvaj dioj, tiuokaze unu lingvo sufiĉas. La grekoj el la antikvaj tempoj ĵuris, ke la voĉoj de la dioj aŭdiĝis nur ateningve.

Tradukis Chr. F. W. Slijper.

34-a Universala Kongreso de Esperanto
Bournemouth, Anglujo
6-13 Aŭgusto 1949



Adreso por leteroj : 34-a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Kongresejo : La Urbdomo, Bournemouth.

Kongreskotizoj :		ĝis	31.3.49 poste	
Kongresano ..	.. ŝil.	35	40	
Edzo aŭ edzino de kongresano ..	.. ŝil.	17.50	20	
Junul(in)o ne pli ol 20-jara ..	.. ŝil.	15	20	

Kongreskarto : Tuj post ricevo de la aliĝilo kaj kotizo, L.K.K. sendos al vi provizoran kongreskarton kun informoj kaj mendilo por loĝejoj kaj ekskursoj. Al informpetoj bonvolu aldoni internacian respondkuponon (Britoj, poŝtmarkon).

Glumarkoj : Mendu kaj uzu la belajn kongresajn glumarkojn. Por 6p. aŭ du rpk. oni ricevos folion da 20 glumarkoj.

Presaĵoj : Disdonotaj en la kongresejo aŭ en kongresaj kunvenoj devas esti aprobitaj de L.K.K.

Salutoj : Ĉe la solena inaŭguro oni rajtos saluti en la nomo de registaro nur se ni estos antaŭe ricevintaj oficialan informon de la koncerna registaro.

Landaj Asocioj devus informi nin pri la nomo de tiu, kiu salutos la kongreson en ĝia nomo, antaŭ la fino de Junio.

Somera Universitato : Ni jam ricevis kaj akceptis kelkajn bonajn proponojn pri prelegoj, kaj ni volonte ricevos aliajn proponojn de vere kompetentaj personoj, prefere universitataj profesoroj.

Transporto : Kun granda plezuro ni informas, ke danke al la komplezemo de la urbaj aŭtoritatoj, kongresanoj portantaj la kongresan insignon rajtos uzi urbajn omnibusojn senpage.

Gazeto : La ĉefa loka ĵurnalo jam promesis presigi kolonon de novaĵoj en Esperanto dum la kongresa semajno.

Poŝtejo : Kompreneble, funkcios poŝtejo en la kongresejo kun speciala kongresa stampo. La britaj poŝtaŭtoritatoj jam promesis eldoni Esperantlingvan libreton kun poŝta informo. En Bournemouth 40 poŝtistoj nun lernas Esperanton.

Antaŭkongreso : La Londona Esperanto-Klubo aranĝas Antaŭkongreson en London je la 4-a kaj 5-a de Aŭgusto. Detaloj estas haveblaj ĉe: S-ro J. W. Leslie, 50 Hillfield Park, Muswell Hill LONDON N.10 kontraŭ respondkuponon (aŭ, d Britoj, afrankita koverto.)

Somera Lernejo : La Societo de Britaj Esperantistaj Geinstruistoj aranĝas Someran Lernejon tuj post la Kongreso, de la 13-a ĝis la 20-a de Aŭgusto, en Bletchley, Bucks., je unuhora vagonarveturo de Londono. Nur lernejoj geinstruistoj rajtos partopreni ĝin. Kosto estos inter £4. 14ŝ. kaj £6 por la tuta semajno. Sendu respondkuponon por informoj kaj aliĝilo al la sekretario: F-ino V. C. Nixon, 183 Woodlands Park Road, Bournville, BIRMINGHAM 30, Anglujo.

Aliĝoj : Ĝis la 3-a de Decembro aliĝis 468 kongresanoj laŭ la jena tabelo: Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 1, Belgujo 6, Brazilo 2, Britujo 336, Bulgarujo 2, Ĉeĥoslovakujo 6, Danujo 8, Finnlando 5, Francujo 10, Germanujo 1, Hispanujo 1, Hungarujo 1, Irlando 4, Italujo 7, Jugoslavujo 3, Kanado 2, Nederlando 13, Norvegujo 9, Polujo 3, Portugalujo 1, Svedujo 34, Svisujo 7, Usono 4. (25 landoj).

Aŭtuna kunveno

Ekstere blovadas la ventoj,
 L'aŭtunaj folioj defalas ;
 Sed restas en flamo korsentoj,
 La sango de l'rondo ne palas.

La ĉambrojn trakuras malvarmo,
 Somera zefir' ne karesas ;
 Sed kuras ideoj en svarmo,
 La fajro interna ne ĉesas.

La gutoj post gutoj eksteraj
 Nur ĝene, surface, laboras ;
 Sed gutoj el koro, sinceraj,
 Eĉ monton granitan traboras.

J. D. Applebaum.

ESPERANTISMAJ PROBLEMOJ

VII.—La fina venko

La fina venko estas specimeno el la frazkolekto de nia propagando, diraĵo pri kiu ekzistas diversaj interpretoj. Iurilate ĝi similas al alia gvidvorto de nia movado, t.e. la *interna ideo*, ankaŭ komprenata diversmaniere. Ĉiu movado havas tiajn gvidvortojn; ni citu nur kiel ekzemplon *la fina batalo*, fariĝinta batalo sen fino. Klareco estas la patrino de la kompreno. Ni provu kompreni la sencon de nia *fina venko*.

En la tempo de Volapük, kiu estis la unua provo de publika agado por tutmonda lingvo, regis la gvidvorto *Manade bal, püki bal* laŭ la *Biblia Unu homaro, unu lingvo*. Ĝin la esperantistoj anstataŭigis per la pli realeca *la dua por ĉiu, la sama por ĉiu!* Pri la rolo de nia lingvo regas unuforma kompreno inter ni: **helpa lingvo, kompletiganta la naciajn idiomojn, ne detruanta ilin.**

Kio estas, aŭ kion oni devas kompreni sub, *fina venko*? Por multaj fervoruloj ĝi estas nur la ĝenerala adopto aŭ enkonduko de la uzado de Esperanto en internaciaj rilatoj, ŝtataj kaj privataj. La publikaj servoj, poŝto, fervojo, dogano, polico k.a. havas personarojn povantajn paroli internacilingve. Krome, la internserva uzado de administracio al administracio de unu lando al alia uzas internacian rimedon, rolon kiun plenumas pli malpli kontentige la franca lingvo, kun forta konkurenco de la angla. La privata uzado ekster la skriba okazus do ĉe manifestacioj internaciaj, kongresoj k.s. Kiam la unua idealo, la uzado en publikaj servoj, estos realaĵo la senco de la vorto *esperantisto* plilarĝiĝos. Estos do personoj parolantaj la lingvon, kaj ideaj esperantistoj, por kiuj la lingvo ne estos nura parolilo.

La kompleta, la centprocenta fina venko estus la enkonduko de la deviga instruado de Esperanto en la oficialaj lernejoj, ŝtataj aŭ komunumaj, kaj tion oni ĝenerale komprenas sub *fina venko*.

Hodiaŭ post sesdekjara ekzistado de Esperanto tiu ĉi fina venko malproksimiĝis. Miloj da kursoj fakultativaj en publikaj lernejoj ne proksimiĝis nin al la celo: oficiala deviga instruado de Esperanto.

Kritikemuloj en niaj vicoj argumentas, ke kulpas pro tiu ĉi nesukceso la metodoj en nia propagando kaj manko de kunordigo en la klopodado. Estus malfacile por ili pruvi tion! Certe estas, ke klopodado dependanta de la bonvolo kaj de la financoj de unuopuloj ne povas koncentrigi ĉion je sama momento kaj sama

punkto. Ni jam konis imponan entreprenon, kiu, farita laŭ oficiala ordono kun konsiderindaj rimedoj kaj kompetentaj agantoj, ne havis la sukceson kiun ĝi meritis. Tio estis la grandioza enketo de la Ligo de Nacioj en 1920–1922. Ke la brilaj konkludoj de tiu ĉi enketo ne estis aprobitaj de la kunveno de la Ligo de Nacioj, tion ni ŝuldas al la ekstrem-nacia tendenco precipe de unu granda nacio. Ni ree devos batali kontraŭ tiu ĉi naciisma, mallargha spirito etendiĝanta pli kaj pli.

La sola kialo de la mankanta fina venko sidas en la sekvoj de la naciismo. La unua eksplodo estis la tutmonda milito 1914–1918, kiu forte kurbigis la suprenirantan linion de Esperanto. La dua estis la izoligo de Sovetio, kio poste fariĝis izoliĝo! La tria estis la renaskiĝinta naciismo en la plimulto de landoj, kio paralizis ĉiun progreson en la tuthomara penado en la Ligo de Nacioj. La plej grava bato venis de la Tria Regno, kies agado kondukis al la dua mondmilito. La venko super la Hitlerismo signis ankaŭ por ĉiuj tre gravan faktan: la sentronigon de Eŭropo kiel decida faktoro en tutmondaj aferoj. Ni diru ĝin malkaŝe, ke la eŭropanoj neniam kapablis krei eŭropan unuecon kaj penson. En tiu ĉi bankroto de nia kontinento, kies ĝerموj reiras ĝis 1848 ni vidu la ĉefan kaŭzon de la ekstera fiasko. Konante la originon ni facile povas direkti niajn penadojn por atingi la celon. Plej grava kondiĉo estas la stabiligo de la situacio en Eŭropo. Dua ne malpli grava kondiĉo estas la ekzisto de uzantaro de Esperanto, la apero de bonaj libroj, la okazigo de esperantistaj manifestacioj. Ĉiu aŭtoritato publika, kiu iam esploras la situacion de la internacia lingvo, ne povos preterlasi aŭ ignori la vastan uzadon de Esperanto. **Kaj tio estas nia atuto**, kiu certigos tion, kion ni ĉiuj deziras: la finan venkon!

Hans Jakob.

Lermontov:

Montaj Pintoj

Montaj pintoj dronas
Nokte en mallum';
Valoj jam ne sonas
En nebula fum'.
Polvas voj' neniom,
Kaj sen trem' foli' . . .
Nur atendu iom
Kaj ripozos vi.

elrusigis M. Soloviev.

ESPERANTO EN LA PRAKTIKO

Esperanto-Press : Internacia Informa Servo—Foto-arkivo. Per siaj *Bultenoj* Esperanto-Press volas liveri interesan materialon por profesia ĵurnalista laboro. Samtempe ĝi volas pruvi, ke Esperanto estas taŭga helpilo por la internacia ĵurnalismo.

La graveco de tiu informservo **per Esperanto** estas substrekitaj per la fakto, ke ĝi estas oficiale rajtigita havi specialan reprezentanton ĉe la Informa Centro de la Unuigitaj Nacioj en Ĝenèvo. Por la unua fojo la tutmonda gazetaro ricevas nun informojn pere de Esperanto pri la grandaj internaciaj konferencoj, kiuj serĉas rekonstrui Eŭropon kaj pacigi la mondon. Kunlaborantoj estas bezonataj por aperigi la informojn en nacilingvaj gazetoj. Oni sin turnu al : Esperanto-Press, Mühlebachstr. 47, ZÜRICH 32, Svislando.

K.L.M. Historio. En 8-paĝa broŝuro la mondfama aviadentrepreno K.L.M. (Reĝa Nederlanda Aerlinio) prezentas al la Esperantistaj legantoj kalejdoskopon bildon pri siaj ekesto, evoluo kaj nuna stato. En ĝia flughaveno Schiphol apud Amsterdam deĵoras pluraj Esperanto-parolantaj oficistoj kaj la entrepreno estas gratulinda pro la iniciato esti la unua internacia flugentrepreno, kiu alprenis kaj praktike uzas la unusolan internacian lingvon.

Konstitucio de Ĉeĥoslovaka Respubliko : Gravega paŝo flanke de la oficialaj instancoj en ĈSR. Post la multaj ŝanĝoj, kiuj okazis kaj okazas en Ĉeĥoslovakujo, la tuta ekstera mondo scivolas pri la signifo kaj celo de la agado politika en tiu lando. Per ĉi tiu malgranda broŝuro la Ĉeĥoslovaka Respubliko konigas al la mondo sian Konstitucion. La libreto estas senpaga, sed **oni nepre sendu respondkuponon** por kovri la afrankon. La libreto aperis en eldono de 15000 ekzempleroj, kaj estas la tasko de la internacia esperantistaro montri sian intereson per amasega alskribo kaj petado por ĉi tiu unika verko. Oni sin turnu al : Instituto de Esperanto-Servo, Malá Stěpánska 7, PRAHA II, Ĉeĥoslovakujo.

Esperanto-Servo : Enmaniĝis al ni la unua numero de la *Informa Bulteno de Praha*, kiu celas prezenti al la mondo per Esperanto la faktojn pri la vivo, kroniko kaj ekonomio de la nova popola respubliko. Kiu sin anoncos al Esperanto-Servo (adreso supre, en Praha) ricevos la *Informan Bultenon* regule kaj se oni fidele resendos la kuponon donatajn oni povos ricevi belan ilustritan libron pri Ĉeĥoslovakujo.

Tyrol : kun la jena titolo eldoniĝis unu el la plej belaj turismaj gvidfolioj, kiujn ni ĝis nun vidis. Ĝi estas en Esperanto kun allogaj fotoj kaj estas eldonita de la Landa Trafikoficejo de Tirol, INNSBRUCK, Aŭstrujo.

Tatra Trinklimonado : dum la pasinta somero samideano J. Pavlacky en Veselí nad Mor., Ĉeĥoslovakujo estis konstanta reklamanto en nia gazeto. Li nun anoncas, ke rezulte de 5 anoncoj en *Esperanto* li ricevis 112 mendojn por sia Tatra-limonadpulvoro el 19 landoj. S-ro Pavlacky estas iom kontenta pri tiu unua eĥo el la eksterlando kaj venontan someron intencas disponigi eĉ pli bongustan limonadpulvoron. Kompreneble, oni ankoraŭ povas mendi ĝin.

Kiel enkonduki Esperanto en la F.S.M. (Tutmonda Federacio Sindikata) ?

Konsiderante, ke la esperantista celo estas la enkonduko de la lingvo en gravajn internaciajn organizaĵojn, ni esperantistaj sindikatoj devas unuigi niajn fortojn por trafi tiun celon ĉe F.S.M. Ni jam konstatis, ke klopodoj faritaj senpere al la estraro ĉiufaje malsukcesis, ĉu pro malfavoro de la diversaj estraroj al Esperanto, ĉu pro kontraŭstaro de Idistoj, Occidentalistoj, Basic-English-istoj k.s.

Pro tio ni decidis agadi per nia lingvo kaj pruvi per konkretaj faritaĵoj la taŭgon de Esperanto. Tio estas farebla ĉe F.S.M. ĉar ni povas efektivigi plenumindajn taskojn de tiu organizaĵo ĝis nun ne faritajn, ekzemple : eduki ĝiajn anojn, naskigi ĉe ili internacian solidaron, unuigi ilin por la sindikata agado.

(a) Edukado de la anoj : Tion ni efektivigos parte per nia bulteno, kiu informos niajn legantojn pri sindikata novaĵo tra la mondo.

(b) Internacia solidaro : naskiĝas nur per internaciaj renkontoj, legado kaj korespondado. Nur Esperanto ebligas tion.

(c) Unuigado de la laboristoj por agado : Tio estos efektivebla per praktika demonstraciado de faktoj montrantaj la avantaĝojn de kuna agado, pere de nia organo.

Sindikatoj kaj precipe F.S.M.-anoj, aniĝu al Sindikata Esperantista Asocio Tutmonda (S.E.A.T.) kaj sciigu viajn ideojn kaj proponojn al tiu organizaĵo ĉe 20 rue du Béquet, BÈGLES (Gironde), Francujo.

Esperanto kaj Rotario

Esperantistaj Rotarianoj interesiĝantaj je eventuala restarigo de la Esperantista Rotario-Amikaro, bonvolu sciigi la koncernajn ideojn al : G. Facchi, Corso V.E. 64, BRESCIA, Italujo.

Nov-zelando

S-ro James Thorn, provizora estro de la Novzelanda delegacio al la Kunvenoj de UNO en Parizo, bonvolis prezidi la malfermon de la ĉiusemajnaj kunvenoj de la Pariza Esperantista Grupo por la jaro 1948-49.

S-ro Thorn faris paroladon en la angla lingvo, kiun tuj tradukis Raymond Schwarz en Esperanton. S-ro Warnier, Prezidanto de la Franca Unio Esperantista, dankis S-ron Thorn.

Oni poste projekciis la filmon eldonitan de la Novzelanda Registaro, kaj legis parton de la Esperanta teksto, kiu akompanas la filmon. Oni menciis, ke la Novzelanda Registaro volonte sendos fotojn de tiu lando kontraŭ peto en Esperanto ĉe: NovZelanda Registara Turisma Oficejo, P.O. Box 3037, WELLINGTON, Novzelando.

Grava politika partio aprobas Esperanton

La plej malnova politika partio en Brazilo estis fondata en la 18-a de Aprilo 1873 kaj de tiam ĝis nun estas nomita Partido Republicano (Respublika Partio). Jam de 1870 ekzistas kluboj kaj grupoj kontraŭ la Imperio; en la 18-a de Aprilo 1873 tiuj grupoj kunvenis en Itú, Ŝtato de S. Paŭlo, kaj fondis fortan partion, kies venkoj efektive skribis la Historion de la Brazila Respubliko.

Per vigla tutlanda agado, de 1873 ĝis 1889, tiu partio faligis la Imperion, ekzilis la Imperiestron Petro II-a kaj starigis en la lando tre liberaman kaj progreseman demokratian respublikon. La plej multaj kaj ankaŭ la plej famaj Prezidantoj de la Brazila Respubliko estis balotitaj de tiu malnova kaj potenca partio.

Al la nunjara tutlanda Kongreso de tiu partio, en Belo Horizonte, Minas Gerais, la afero Esperanto estis prezentata per propono subskribita de la tuta Estraro de la Partia Fakto de la Federacia Distrikto, Rio de Janeiro, kaj parole defendata de Ing. Leŭtenanto Laŭro Timponi, kies patro, nia eminenta samideano D-ro Miĥael Timponi, estas Prezidanto de la partio en Rio de Janeiro kaj redaktis la altvaloran proponon por Esperanto. Kun entuziasmo kaj unuanime la Kongreso aprobis la proponon kaj ĝin sendis al sia reprezentantaro ĉe la Brazila Parlamento, por konsiderado okaze de la baldaŭa reformo de la programo de instruado.

Jam de la tempo, kiam la partio regadis la landon, ĝi jam ne estas revolucia, kiel en sia komenciĝo, sed konservativa forto, kaj tial ĝia aprobo al la afero Esperanto montras, ke Esperanto estas respektata kaj ŝatata de la plej konservativaj klasoj en Brazilo.

B.L.E.

Esperanto en la Aertrafiko

La Dana Aertrafiko Kompanio DDL, kiu estas la dana partoprenanto en Skandinava Aerlinia Sistemo, eldonas en Januaro 1949 broŝuron en Esperanto. La broŝuro estos dissendata al partoprenontoj en kongresoj, kursoj, k.s. Esperantistoj, kiuj ne alimaniere ricevos ĝin, povos peti la bezonatan kvanton ĉe: Det Danske Luftfartselskab A/S, reklameafdelingen, Store Kongensgade 29, KØBENHAVN K, Danlando. Danoj, norvegoj kaj svedoj skribu en sia gepatra lingvo, alilingvanoj en Esperanto.

Dana Esperantista Komun-Komitato.

Konfeso

(ŝerca akrostiko por albumo)

Mia devo estas diri
Indan veron, tamen tim'
Apud vi eĉ laŭte spiri
Metas min al ruza rim'.
Antaŭ vi mi buŝon baras,
Sen parolo, sen esper';
Vin evitas mi, eraras . . .
Inter grandliteroj staras
Nur por vi—silenta ver'!

M. Soloviev.

ESPERANTISTA VIVO

Niaj Mortintoj

Ni sciiĝis pri la forpaso de la jenaj samideanoj. Al iliaj familianoj ni esprimas nian profundan kondolencon.

Chiba, S-ro Leopold, estinta prezidanto de Aŭstria Katolika Ligo Esperantista, Vieno, 75-jaraĝa, la 26an de julio 1948.

Jacklin, S-ro Charles E., nia delegito en Hull, Anglujo, mortis komence de novembro 1948.

Jennen, F-ino A., St-Gilles, Bruxelles, Belgujo, mortis je la 22a de novembro 1948.

Lefevre, S-ro Charles, delegito de UEA en Cannes, Francujo, forpasis komence de oktobro 1948, 75-jaraĝa. Li kunfondis la tiean grupon, gvidis kursojn, varbis kaj instruis multajn. Li praktikis plej sindone kaj delikate veran Esperantismon.

Parker, Pastro P.P., Wexford, Irlando, prezidanto de la Irlanda Ligo de Katolikaj Esperantistoj, forpasis la 19an de septembro, 80-jaraĝa. Lia nomo estis en la listo de Esperantistoj en 1906.


Schünemann, S-ro Heinrich, Hamburg, Germanujo, forpasis je la 6a de novembro 1948, 78-jaraĝa. Prezidanto de loka grupo, li ĉiam fervore laboris por nia movado.

Starchová-Hartmanová, S-ino Libuše, instruistino en Praha kaj kunfondinto de la Rondeto de Esperantistinoj, forpasis la 9an junio 1948.

Zsidó, F-ino Iréna, delegito en Mindszent, Hungarujo, mortis en junio 1948.

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe U.E.A.



Internacia Lingvo : Antaŭ-parolo kaj Plena Lernolibro (Por Rusoj) de D-ro Esperanto. 48 p. kartonita : prezo 10ŝ. 6p.

Jes, kara leganto, ankaŭ mi kun miro legis la jenan titolon de ĉi tiu libreto, des pli kiam mi rimarkis la daton sur la kovrilpaĝo : 1887 ! Ekzameno tamen malkovris la misteron. Ĉi tio estas faksimila represo de la fama *Unua Libro de Esperanto*, farita de la entrepreno *Eldono Vilho Setälä* en Finnulo, en limigita eldono de 250 ekzempleroj, ĉiu numerita.

Kun la scivolo kaj intereso, kun kiuj oni ekzamenas ĉi tiun libreton, nepre miksiĝas ia stranga sento de emocio je la penso, jen la modesta komenco de nia afero ! Per ĉi tiu modesta kajero—same netrudemata kiel ĝia aŭtoro, sed firma kaj neŝanceliĝa atesto pri liaj konvinko, obstino kaj espero—iris en la grandan mondon la unua sciigo pri la mirinda instrumento, kiu povus ludi en la homa evoluo tiom gravegan socian kaj kulturan rolon.

La pligranda parto de la libro estas en rusa lingvo, sed jen sur paĝoj 31–34 ni vidas la famajn blankedojn sub titolo *Promeso* kun teksto : “Mi, subskribita, promesas ellerni la proponitan de d-ro Esperanto lingvon internacian, se estos montrita, ke dek milionoj personoj donis publike tian saman promeson.”

Kiom da fido kaj espero kaj optimismo troviĝas en tiu naiva atendo !

Estas certe, ke multe da samideanoj volos posedi ĉi tiun neordinaran eldonaĵon se nur pro sentimentalaj motivoj, kaj estas iom bedaŭrinde, ke la limigita kvanto kun sekve alta prezo metas ĝin preter la aĉetkapablon de tre multaj literaturamantoj.

M.S.

Step By Step in Esperanto : de M. C. Butler ; eld. The Esperanto Publishing Co. Ltd. 18.4×12.5 cm. 280 p. bindita, prezo 7ŝ. 6p.

La fakto, ke ĉi tiu lernolibro por Anglalingvanoj atingis sepan eldonon, estas mem atesto pri la populara allogo de la prezento de ĝia materialo ; kaj estas fakto, ke jam dum jaroj Britaj Esperantistoj kutimas citi kaj sekvi la konsilojn de M.C.B.—majuskloj konataj tra la tuta Angleparolanta mondo de Esperantistoj. Ĉi tiu eldono estas tute reviziita, kaj kiu konas la ĝisfundemon de S-ro Butler ne bezonas atentigon, ke tio signifas mikroskope detalan ekzamenon de ĉiu ero antaŭ prezento.

Al la fidinda gvido pri la uzo de ĉi tiu kaj tiu elemento de la lingvo, la aŭtoro aldonas modelajn tekstojn ĉerpitajn el klasikaj fontoj aŭ el la propra trezorejo de karakterizaj, spritaj kaj pensigaj fragmentoj.

Pri ĉi tiu libro la studanto povas havi plenan fidon, ke ĝi kondukos lin sur la ĝusta vojo al posedo de la lingvo kaj la progresinto kun profito povos repaŝi malnovan terenon tra ĝiaj paĝoj.

La teknika prezento estas laŭdinda kaj liveras libron kun bona papero, bela kaj praktika bindo kaj klara preso. La eldonistoj rajtas fieri pri la rezulto. Ke ili baldaŭ bezonu okan eldonon !

M.S.

Parolspuro : Instruaj ĉartoj de H. Köhrmann, Kaiserstr. 19, (22a) Wuppertal-Vohwinkel, Germanujo. Prezo 4 rpk.

Ĝuste kiel oni daŭre projektas novajn mondlingvojn, tiel same oni daŭre projektas novajn sistemojn de stenografio, kaj la elpensintoj kutime pretendas al ridinde neebila rapideco por sia sistemo.

Iuj sistemoj estas nur mallongigoj de la ordinara skribado ; aliaj estas *geometria* sistemoj uzantaj liniojn, cirklojn, hoksignojn k.t.p. en diversaj manieroj. *Parolspuro* estas geometria sistemo, kiu pretendas nur al rapideco trioble pli granda ol ordinara skribado, kaj oni ne povos uzi ĝin por laŭvorta raportado.

La verkinto tamen pretendas, ke oni povas uzi ĝin por ĉiuj lingvoj kaj miaopinie tio ne estas konsilinda. Ĉiu lingvo posedas sian propran karakterizaĵaron kaj bezonas apartan sistemon de stenografio. Ekzemple, en la angla lingvo la plej ofta **sono** (ne litero) estas *s* ; tial ĉiu efika angla sistemo speciale traktas tiun sonon. La sama traktado en alia lingvo, en kiu la sono *s* eble estas iom malofta, estus malŝparo de unu el la tre limigitaj geometriaj signoj.

Por tiu, kiu interesiĝas pri stenografiaj sistemoj la ĉartoj tamen meritas tralegadon kaj tradadon. La prezo ja ne estas baro.

A. Fisher.

Esperantista Poŝkalendaro 1949 : eldonis Klubo Esperantista en Hradec Kralove ; 175 p. bind. 14.3×10 cm. Prezo 8 rpk.

Ankoraŭfoje la ambicia klubo en Hradec Kralove eldonis sian poŝkalendaron, kun multe da informoj, kalendaro por la jaro, Deklaracio de Bulonjo, poŝta tarifo en ĈSR, horokomparoj pri diversaj partoj de la mondo, entreprenoj kiuj uzas Esperanton, (bedaŭrinde ne alfabeto listigitaj !), tre ampleksa taglibro kaj Gramatiko de Esperanto—ĉeĥlingve ! Sinceran gratulon pro bela iniciato.

M.S.

R. Sakowicz:

LA BATALO DE LA LINGVOJ

En la konata *Raporto pri esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia*, legita de S-ro L. de Beaufront en 1900 dum la kongreso de la franca asocio de la progreso kaj sciencoj, la aŭtoro, kaŝanta sin sub la pseŭdonimo *Unuel* (multe poste D-ro Zamenhof malkaŝis sian aŭtorecon), kun fera logiko pruvis la eblecon kaj necesecon de la artefarita lingvo internacia.

En unu el la ĉapitroj de la *Raporto* Zamenhof profete diris: "Se oni ekdeziros elekti ian lingvon vivantan de ia el la ekzistantaj nacioj, tiam kiel granda malhelpo tie ĉi aperos ne sole la reciproka envio de la popoloj, sed ankaŭ la tute natura timo de ĉiu nacio jam simple pri sia ekzistado; ĉar estas afero tute kompreneble, ke tiu popolo, kies lingvo estos elektita kiel internacia, baldaŭ ricevos tian grandan superforton super ĉiuj aliaj popoloj, ke ĝi ilin simple dispremos kaj englutos."

En tiu tempo senrivale regis la sola internacia lingvo, la franca, de multaj jarcentoj heredanta sian rolon de la latina.

Estas interese, ke eĉ la packontrakto inter Germanujo kaj tragike venkita Francujo, kiu estis subskribita en 1871 estis redaktata nur en la franca lingvo! *Fera Kanceliero* Bismarck dum la tuta sia vivo estis sub la influo de la franca lingvo.

Iom poste, dum la Kongreso de 1878, Lordo Beaconsfield (tiam nur modesta Disraeli) provis uzi la anglan lingvon, sed sensukcese. La tiutempa edukado de la plej altaj klasoj de la societo en Eŭropo, al kiuj apartenis la reprezentantoj de la internacia diplomataro, tute klare substrekis la senrivalecon de la franca lingvo en internaciaj rilatoj. Ĝis la fino de la unua mondmilito ne ekzistis la demando de internacia diplomata lingvo.

La unuan fojon ĝi estis starigata en 1919 dum la diskutado de la traktato en Versailles. Prezidanto Wilson kaj Lloyd George starigis tiun ĉi demandon kaj la aristokrata diplomataro estis devigata submetiĝi al la demokratiĝinta mondo. La unuan fojon en la internaciaj diplomataj interrilatoj, la senrivala franca lingvo ne nur devis akcepti novulojn, sed eĉ konsenti, ke la traktato estu redaktata en du lingvoj kaj la tekstoj de ambaŭ lingvoj estu aprobataj kiel egale devigaj.

La malvenko de la franca lingvo ŝajnis nur duma ĉar jam packontrakto kun Aŭstrujo, subskribata en Saint Germain en la sama 1919, aprobis kiel oficialan nur la tekston en la franca lingvo. Ankaŭ iom poste la komerca traktato

inter Ĉeĥoslovakujo kaj Rumanujo estis redaktata nur en la franca lingvo.

Sed post la dua mondmilito aperis nova, neatendita kaj minaca rivalo—la lingvo rusa.

La Konferenco en San Francisco en 1945 rekonis la oficialan uzadon de la rusa lingvo samtempe eligante la venkitan francan. En tiu sama jaro aperis en *Esperanto* tre interesa artikolo de ĝia redaktoro, S-ro H. Jakob, kiu same konstatis la krepuskon de la franca lingvo.

Sed en 1946 dum la konference en Parizo la franca lingvo denove aperis kune kun la angla kaj rusa, kiuj tiom plifortiĝis, ke la paroladoj farataj plejparte en la franca lingvo, devas esti tradukataj en tiujn ĉi du oficialajn lingvojn.

En 1947, dum la subskribado de la packontraktoj kun Finnujo, Bulgarujo, Hungarujo kaj Rumanujo, venis la grandanima novaĵo: ĉiu venkita kontraktanto subskribas la packontrakton en sia landa lingvo. Sed tiuj ĉi packontraktoj, malgraŭ ke ili estas subskribitaj en Parizo, eligas la francan lingvon cede al la nova venkanto—la rusa!

Sed restas la monda institucio, kiu staras flanke de tiu ĉi lingva batalo kaj kie ankoraŭ regas la aero de la deknaŭa jarcento. Ĝi estas la Internacia Juĝkomitato en Hago. Kiam en marto de 1948 ĝi esploris la kverelon anglo-albanan, malgraŭ ke ĝi estis devigata allasi ankaŭ la anglan lingvon, la oficiala teksto estis rekonita nur la franca.

Sed la nove veninta lingvo rusa komencis sian ofensivon. En julio de la nuna jaro, dum la Danuba Konferenco en Beograd, la soveta delegacio altrudis la akcepton de nur du oficialaj lingvoj: rusa kaj franca. La angla lingvo estis tolerata nur kiel laborlingvo.

Ni aldonu, ke la reprezentantoj de la soveta delegacio en UNO kaj aliaj internaciaj konferencoj parolas nur ruslingve kaj ne preterlasas la okazon ataki la konkurantan anglan. Dum la nuna konferenco de UNO en Parizo unu el la kunsidoj devis esti prokrastata pro postulo de la soveta delegacio, kiu protestis, ke la disdonita al la membroj raporto estis presita nur en la angla lingvo.

Ĉio supre citita klare montras la pravecon de la profetaj vortoj de nia Majstro kaj ni opinias, ke same prava kaj profeta estas lia konkludo de la *Raporto*, konstatanta, ke lingvo internacia de la venontaj generacioj estos sole kaj nepre nur Esperanto.

Saldanha Carreira :

ESPERANTO—POPOLA LINGVO

Grava portugala eldonejo *Grande Enciclopédia Portuguesa e Brasileira* mendis al mi artikolon pri *Internaciaj Lingvoj* por la Enciklopedio. Mi akceptis la mendon.

Dum la prepara laboro, travivante la diversajn epokojn kaj klasifikante multenombrajn slipojn, mi konstatis, ke Esperanto dupartigas la tutan problemon pri lingvo internacia je la jenaj du grandaj periodoj :

1-a periodo (1178 ĝis 1887)

Filozofiaj sistemoj	..	..	14%
Pasigrafiaj sistemoj	..	..	18%
Bazitaj sur naciaj aŭ latina lingvoj			2%
Diversaj	..	..	6%

ESPERANTO (1887)

2-a periodo (1887 ĝis 1946)

Filozofiaj sistemoj	..	..	2%
Pasigrafiaj sistemoj	..	..	4%
Bazitaj sur naciaj aŭ latina lingvoj			25%
Diversaj	..	..	7%
Bazitaj sur Esperanto..	..	..	22%

Analizante la ĉi-supran skizon, ni rimarkas, ke la procentoj en la du periodoj notinde diferencas.

En la unua periodo regas kompreneble la filozofoj. La pensistoj ja komprenas la malutilon de lingva diverseco en la ĝeneralaj interrilatoj kaj serĉas rimedon.

Sociale, la amaso estas nekalkulinda. Oni pretendas internacian lingvon, kiu helpu la altan laboron de la sciencistoj ; la matematikistoj donas gravan konsideron al tiuj provoj. Moralo ne gravas, etikaj principoj ne bezonas ekziston, la malaltan klason oni ignoras, ĉar ĝi havas nur devojn, ne rajtojn, kaj ne meritas priokupon.

Eĉ je la fino de la 19-a jarcento, Volapük estis apartenaĵo de la elito ; Schleyer krude proklamis sian elpensadon la lingvo de la mondo, sed vortoj neniel kongruis kun la verko, mankis al tiu lingvo la popola animo.

En la dua periodo pligrandiĝis la nombro de la aŭtoroj kun la pliampleksiĝo de la internacieco. La laboroj, precipe tiuj de la 17-a kaj 18-a jarcentoj, altiras la intereson de la 19-a kaj 20-a al tiu temo, sed la progreso jam pli kaj pli alproksimigas la homojn kiuj, malgraŭ historiaj kaj tradiciaj sensencaĵoj, taksas pli valoraj la profitotan tempon kaj la internacian helpon. Foje tiu kompreno de neceseco al internacia lingvo iĝas tiel granda, ke sama aŭtoro verkas

du, tri, eĉ kvin artefaritajn lingvojn, kiel ekzemple, Sidni Bond kun siaj Mondlingu, Omnez, Domni, Optoez kaj Meso.

Laŭdinda bonvolo, sed nek firma nek konscia aŭ efika laboro.

Ĉu sinceraj tiuj verkistoj ? Certe.

Mi ne dubas, ekzemple, la sincerecon de mia amiko Alfred Michaux kiam, nur por viziti min en Wimereux, li biciklis sesdekjara de Boulogne-sur-Mer kvin kilometrojn kaj klopodis konvinki min pri la taŭgeco de sia *Romanal*. Mi tre dankis lin pro la donacitaj ekzempleroj, tamen post kelkaj tagoj mi skribis al li, ke *Romanal* posedis neniajn kondiĉojn fariĝi internacia ; ĝi povus servi sciencistojn, latinistojn, sed ne la popolajn amasojn.

Ĉiuj aŭtoroj de la multenombraj artefaritaj lingvoj apartenas al elito ; tiuj lingvoj ne enhavas iun ajn socian celon.

Trarigardante la enhavon de la skizo, kaj kiel komentarion rapidan pri la konataj sistemoj de internacia lingvo, antaŭaj kaj postaj je Esperanto, ni povas aserti :

(a) la filozofiaj kaj pasigrafiaj ĉiuaspekte atingas transcendecon, eblan nur al fortaj memoroj kaj disvolviĝintaj mensoj ;

(b) tiuj bazitaj sur la latino—malfacilaĵoj kaj mankoj ne parolataj—povus servi la romanon grupon de la indo-eŭropa branĉo, iomete la germanan, sed neniel la slavan kaj malplie tiujn, kiuj formas ceterajn branĉojn de la lingvistiko ;

(c) tiuj, kiuj bazas sin sur la naciaj lingvoj, precipe la angla, povus proponi akcepteblajn gramatikajn karakterizojn, sed tute malsukcesas pri la plej kompleksa parto—la vortaro ;

(d) lingvo nacia, kiel helpa, flankata de ĉiu nacia, ankaŭ ĉial ne servas kaj precipe pro la nepravigebla kaj nerajta supereco de tiu lando, kies lingvo estus elektita.

Inter la du periodoj Esperanto sidas sur popola trono. De tiu ĉi ĝi rigardas, antaŭ kaj post sin kaj scias kaj konstatas, ke neniu alia lingvo kontraŭstaras ĝiajn popolajn meritojn.

Esperanto venkis.

Sistemo aposteriora, firme bazita sur internaciaj kaj inspiritaj fundamentoj, pasigrafia per la skriba transmontro de siaj signoj—al iu ideo litero aŭ malgranda grupeto da literoj—pasilalia pro la tre klara kaj facila parola interpreto—al ĉiu litero unu sono—filozofia pro

la streĉa klasifiko de siaj elementoj, esprimataj per ideologio integre observita kaj determinita; sistemo bazita sur la naciaj kaj la latina lingvoj; pro siaj vivigaj, zamenhofaj principoj kaj kvalitoj, Esperanto venkis.

Ĝi estas popola lingvo, kiu ne postulas institutajn instruadojn; nur pretendas—unue, devigan enkondukon en la Normalajn Lernejojn kaj post du jaroj, devigan instruon en la unuagradaj programoj; ne ambicias katedrojn en Universitatoj, sed la dorlotan apogon kaj ĉeeston de la unuagradaj instruistoj.

Tiuj ĉi, ja tiuj ĉi, apartenas al la popolo, al tiuj kiuj ne povos ĉeesti pli superajn studojn kaj per Esperanto posedos la necesan kaj sufiĉan materialon por povi vivi internacie.

En internacia konferenco okazinta en Parizo en 1937 *Esperanto en moderna vivo* mi estis la sola, kiu preferis por la Esperanta instruado la jaron, kiam la lernanto povas legi sian nacian lingvon, t.e. mi proponis Esperanton kiel devigan lingvon en la plej elementa instruado.

Kaj hodiaŭ mi konfirmas mian diron. Mi tute ne ŝanĝis mian opinion: Esperanto devas eniri devige en la unuagradajn lernejojn kaj, kiel preparon al tiu instruado, oni devas enkonduki ĝin en la normalajn lernejojn dum du jaroj.

La deveno de Esperanto estis popola. Zamenhof vivis kun la popolo, sentis la popolan doloron, donacis siajn verkon kaj koron al la popolo, al tiu, kiu formas la plej grandan kaj viktiman parton de la homaro.

Legu en nia revuo *Esperanto* la diversajn grupojn, kiuj apogas la peton al UNO. La plej multenombraj estas la laboristoj, metiistoj, poŝtistoj, transportistoj, komercistoj—resume, la popolo.

Esperanto venkis ĉar ĝis estas popola lingvo.

Kaj la popolo, iom post iom, fariĝos falango pli granda, pli forta, pli kompetenta, falango kiu imponos finfine al tiu nuna ĉiopova elito, kiu obstine preferas ignori ĝin.

Rigardu la skizon per fiksa rigardo, koncentriĝu, streĉe pripensu la nescion, tiun vundon de la popolaj amasoj, elektu Esperanton kiel balzamon, kaj vi iam komprenos ke amo, kunfratigo kaj paco ne estas vanaj vortoj.

LA VANA KANTO

Lucien Thèvenin

Versoj dediĉitaj al la internacia amikeco

64 paĝoj, broŝ., 2 ŝil. (8 rpk.)

Mendu ĉe U.E.A.

ESPERANTO KAJ RADIO

Redaktata en la Centra Oficejo, Rickmansworth, Anglujo, al kiu oni sendu senescepte ĉion pri tiu rubriko

Mallongigoj: 1=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Ĉiutage	15.30–15.45	Praha. 1935m. kaj 31.41m. I.
	17.15–17.30	Paris. 41.21m. Radio-diffusion Francaise, Emissions espérantistes vers l'étranger, 118 Champs-Élysées, Paris 8.
Lundo	21.00–21.15	Praha. 49.92m. P.
	08.15–08.30	Sveda Radio. 49.46m., 31.46m., 19.80m., 27.83m. P.
	11.30–11.40	PRG2 (Brazilo). 104m. P.
	16.15–16.30	kiel matene.
	21.50–22.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
	22.00–22.30	Ĉeĥoslovakujo. 269m. kaj 325m. Verda Stacio. Arto-programo. (Nur la unuan London de la monato).
Mardo	23.30–23.35	Budapest I. 549.5m. I. Hungara Radio, Budapest VIII, Bródy Sándor u. 7.
	02.15–02.30	kiel je lundo.
	17.55–18.00	Bern. 25.61m. kaj 48.66m. P. de D-ro Baur. Schweizer Kurzwellendienst, Neungasse 28, Bern.
	18.50–19.00	Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia.
	20.45–21.00	Hradec Králové. 238m. (Krom la unua mardo).
	21.00–21.10	Ostrava. 259m. Radiostacio Ostrava, Bráfova 5 (krom la unua mardo de la monato).
Merkredo	10.15–10.35	Paris. 431.7m. K.
	21.10–21.25	Warszawa III. 48.25m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszykowa 8.
Ĵaŭdo	23.30–23.35	Budapest I (kiel je lundo).
	17.45–18.00	Hradec Králové. 280m. Vychod-očky vysilač, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo.
	17.45–18.00	Wien II. 31.05m., 41.81m. kaj 228.6m. K. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.
	17.55–18.00	Bern. 25.61m. kaj 48.66m. P. de D-ro Privat.
	21.50–22.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
Vendredo	21.00–21.10	Ostrava. 259m.
	18.50–19.00	Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia.
Sabato	23.30–23.35	Budapest I (kiel je lundo).
	12.00–12.15	München. 405m. kaj 48.70m. kaj Nürnberg 315.8m. K. (ĉiun duan sabaton.) Radio München, Kulturabteilung Rundfunkplatz 1, München, Bayern, Germanujo.

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni petas informon pri necesaj aliigoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratuleterojn kaj informojn pri ricevo.

PAGU VIAN KOTIZON POR 1949

senprokraste, por eviti interrompon en la livero de la gazeto kaj por helpi al U.E.A.

LA PETSKRIBO

Landoj
(ĝis 1/12/1948)

Germanujo ..	6,213,012	Urugvajo ..	6,204
Ĉeĥoslovakujo ..	1,034,448	Hungarujo ..	6,163
Nederlando ..	1,022,118	Portugalujo ..	3,662
Norvegujo ..	490,382	Aŭstralio ..	3,375
Polujo ..	256,268	Svisujo ..	2,646
Brazilo ..	220,276	Novzelando ..	2,540
Aŭstrujo ..	118,191	Egiptujo ..	2,299
Britujo ..	98,399	Grekujo ..	1,836
Francujo ..	96,404	Maroko ..	1,336
Svedujo ..	72,992	Palestino ..	531
Belujo ..	64,092	Irlando ..	469
Islando ..	28,348	Kanado ..	429
Bulgarujo ..	21,992	Hindujo ..	368
Jugoslavujo ..	14,138	Ĉilio ..	344
Italujo ..	13,991	Sudafriko ..	300
Danujo ..	9,111	Hispanujo ..	276
Usono ..	8,569	Ceteraj lokoj ..	923
Finnujo ..	6,390		
Argentino ..	6,248	sume ..	9,829,070

Okupoj

Artistoj ..	2,229	Navigaciistoj ..	48,198
Delegitoj Komunumaj	535	Parlamentanoj	271
Dentistoj ..	594	Policistoj ..	3,180
Desegnistoj ..	2,254	Presistoj ..	3,946
Dommastrinoj	47,148	P.T.T.-istoj ..	25,647
Edukaj Aŭtoritatuloj	1,185	Religiistoj ..	1,584
Elektristoj ..	3,195	Sciencistoj ..	1,343
Farmaciistoj ..	1,394	Sindikataĉefoj ..	523
Farmistoj ..	49,137	Soldatoj ..	3,530
Hotelistoj ..	1,849	Studentoj ..	40,299
Inĝenieroj ..	14,364	Ŝoforoj ..	2,406
Instruistoj ..	35,110	Ŝtatoficistoj ..	33,943
Juristoj ..	1,823	Teksistoj ..	38,055
Ĵurnalistoj ..	1,274	Transportistoj ..	494,365
Komercistoj ..	67,580	Urboficistoj ..	3,833
Konstruistoj ..	6,695	Vendistoj ..	9,547
Kuracistoj ..	4,673	Vestistoj ..	6,469
Laboristoj ..	124,093	Diversaj ..	8,691,759
Lingvistoj ..	1,540		
Metiistoj Diversaj	53,500	sume ..	9,829,070

Kolektivoj inter 3.11.1948-1.12.1948

Aŭstrujo :	Vojaĝsocieto <i>Wanderver</i> , Graz ..	4,000
Brazilo :	Sindikato de Bankoficistoj, Rio de Janeiro	6,263
Britujo :	Teksista Sindikato, Darwen ..	3,000
	Kooperativa Societo, St. Helens..	33,000
	Fervojista Sindikato (N.U.R.) Eastleigh	1,175
Germanujo :	Socialdemokratia Partio, Köln-Sülz	25,000
	Socialdemokratia Partio, Hamburg	90,000
	Komm. Leitung des Freien Gewerdschafts-Bundes, Berlin	200,000
Polujo :	Powiatowej Radzie Zwiaskow Zawadowych, Jelenia Gora	29,813
	Liga Morska, Zarzad Okregu, Jelenia Gora	27,542
	Polska YMCA, Jelenia Gora ..	1,807
	Unuiĝo de Pola Junularo, Wroclaw	70,000
	Skoltina Societo, Wroclaw ..	5,200
	Skolta Societo, Wroclaw ..	9,000
	Konsilantaro de Profesiaj Unuiĝoj. Radom	26,000

Unuiĝo de Pola Junularo, Radom	1,500
Societo de Laborista Universitato, Radom	4,500
Mara Ligo, Radom	19,500
Kolektivoj kun malpli ol mil : sume ..	3,349
	560,649
Kolektivoj antaŭ 3.11.48 : ..	8,430,441
Dum Novembro :	560,649
Tuta sumo de kolektivoj : ..	8,991,090
Lastmomente : jam	10,000,000

La Lumbrikoj (Tervermoj)

Mi trovis tre interesa la artikolon de M.S. pri la *Stranga Novaĵo ĉe la Terkulturo*, sed iom surprizis min, ke li tute ne menciis la rolon ludatan de la lumbrikoj (tervermoj) en la bonaj rezultoj de semado sen fosado aŭ plugado.

Kiam la lumbrikoj faras siajn tuneletojn en la grundo ili aerumas kaj plifekundigas ĝin enkorpigante humon en ĝin. Malseka aŭtuno kaj abundo da falintaj folioj allogas ĉi tiujn nelacigeblajn grundministojn al la surfaco. Iliaj forĵetaĵoj ĉie troviĝas kaj la ĝardenisto bonvenigas ilin. Se ili estas multenombraj tio signifas, ke la grundo estas en bona stato kaj enhavas sufiĉe da kalko, ĉar la lumbriko preferas alkalecan grundon riĉan je organikaj materialoj.

La lumbrikĵetaĵoj estas grava faktoro en la fekundigo de la grundo. Ili konsistas el minerala grundo kaj organika materialo englutita de la lumbrikoj, pulvorigita kaj miksitaj kun digestaj sekrecioj tiel ke la ĵetaĵoj fariĝas almenaŭ kvinoble pli riĉaj je uzebla azoto, dekunuoble pli riĉaj je uzebla kalio kaj sepoble pli riĉaj je uzebla fosforo ol la supra kaj plej fekunda tavolo de ordinara grundo. Oni kalkulas, ke dudek kvin funtoj da freŝaj lumbrikforĵetaĵoj estas farataj sur ĉiu kvadrata metro da fekunda tero ĉiujare. Tio estas grava fekundigilo ĉar la radikoj de la kreskaĵoj plene utiligas ĝin kaj la solveblajn nutraĵojn en ĝi.

Kiam oni fosas la grundon oni neniam aldonas al ĝia fekundeco. La plej fekunda parto estas la plej supra tavolo kaj la fekundeco iom post iom malpliigas en la malsupraj tavoloj. Ĉu oni fosas profunde aŭ malprofunde, oni metas la plej fekundan grundon sub la malpli fekundan.

La fekundeco de grundo povas esti esprimata kiel la kvanto da solveblaj nutraj saloj haveblaj en la grundo. La fosado metas ĉi tiujn salojn pli malproksimen de la radikoj de la plantoj kaj kaŭzas perdon per drenado.

Ĉi tio helpas klarigi la bonajn rezultojn atingitajn de la ĝardenistoj, kiuj kovras la teron per kompoŝto anstataŭ fosi ĝin.

O. Robotham.

Nia Felietono :

KAPTITOJ DE LA GLACIROKOJ

F. Omelka

I.—La Patrujo bilancas

“Izvéstija! Moskevská Pravda! Times! Evening Standard! Popolo d'Italia! Paris Soir!”

La voĉo de gazet-vendisto eĉ superis la bruon de la Roma strato. Aŭtomobiloj trumpetis, tramoj tintis, ŝarĝaŭtomobiloj peze ruliĝis, hufiferoj de ĉevaloj sonoris sur la malmola pavimo, surstrataj vendistoj de vinoj, legomoj, kaj cigaredoj kriis ne alie, ol se ili persekutus forkurantan ŝteliston — sed la vigla knabo malatentis ĉion. Li haltigis sian veturileton, prenis en la manojn ĵurnalojn kaj lia penetra voĉo denove venkis la surdigan inundon de la voĉoj :

“Izvéstija! Moskevská Pravda! Times! Evening Standard! Popolo d'Italia! Paris Soir!”

Preterirantoj haltadis. Kiel plimalgrandiĝis la nombro de la ĵurnaloj en la manoj de la agema gazetvendisto tiel kreskis la aro da moneroj sur lia pladeto.

“Ĉu vi havas ankaŭ *Petit Parisien*-on?” demandis viro proksimume tridekjara. Li diris tion en itala lingvo, sed la saĝa vendisto divenis laŭ la akcento, ke antaŭ li staras Franco.

“Ne, sinjoro,” li respondis france. “*Petit Parisien*-on mi intertempe ne havas. Sed mi certigas vin, ke en *Paris Soir* vi trovos ĉion. Ankaŭ tion, kion vi sensukcese serĉus en *Petit Parisien*.”

La viro ridetis. Li prenis *Paris Soir* kaj donis al la vendisto bankbileton, kies valoro duoble superis la prezon de la aĉetita ĵurnalo. La knabo volis redoni al li monerojn, sed la aĉetanto svingis per la mano kaj malrapide forpaŝis.

“Mi dankas vin, sinjoro!” vokis post li la vendisto. “Mi deziras al vi agrablon legadon—vi ekvidos, ke la *Paris Soir* vin ne trompos”. Kaj ĉar dume la loko ĉirkaŭ lia veturilo denove iomete malpleniĝis, li komencis ankoraŭ pli atakeme : *“Izvéstija! Moskevská Pravda! Times ——— !”*

La viro, kiu aĉetis francan ĵurnalon, iris al la parko. Li ridetis. Ĉio estis tiom bela Blindige blua firmamento de la itala ĉielo. Kapturna trafiko kaj vigla vivo de la Eterna Urbo. Aŭtomobiloj, tramoj, veturiloj, vendistoj. Ankaŭ tiu gazetisto kaj *Paris Soir*.

Paris Soir Estas vero, li ofte havis okazon legi francan ĵurnalon. Sed tiuj ĵurnaloj havis ĉiam malnovan daton de antaŭ semajno, dek kvar tagoj, monato kaj ankoraŭ pli. Tiu ĉi *Paris Soir* estas tute freŝa, ankoraŭ hieraŭ ĝi estis en Parizo.

En la parko estis trankvile. La tumulto de la strato alflugis ĉi tien kiel el granda malproksimo. Sur la benketoj sidis kelkaj maljunaj homoj. Kelkaj legis libron aŭ gazeton, aliaj rigardis arbojn kaj arbetojn kaj silentis.

La viro eksidis sur la liberan benketon kaj komencis legi. Lia rigardo glitis sur grandaj surskriboj. Enkonduk-artikolo, sciigoj politikaj, kultura rubriko, sporto Kiom mirinda estas ĉio ! Li sidas en la parko, li legas ĵurnalon, li aŭskultas la kanton de la birdoj. Kaj li scias, ke ne ekzistas forto, kiu povus ĝeni lin. Neniu sireno. Neniu alarmo. Neniu batalo, atako, retiriĝo. Ja eĉ neniu ekzerco. Li estas libera. Li estas sinjoro de sia tempo.

La leganto ridetis. Vere, nur nun homo fariĝas denove—homo.

“El la societo.” Anonco pri edziĝfesto, naskiĝo de filo, morto de iu maljuna sinjoro, avanco, gratulo al ora edziĝfesto Nur kelkaj mallongaj jaroj, kaj kiom da penetraj ŝanĝoj !

Kaj ĉi tie—“Juĝa halo”. Tio estas certe denove tiuj ĉiutagaj okazintaĵoj de etaj homoj : ŝtelita kokino, elrabita loĝejo, vagabondeco, almozpetano—sed ne, ĉi tie estas io alia, io pli grava. Jam tiu surskribo !

La viro ĉesis rideti. Ĝis tiu ĉi momento li pli multe ĝurigardis la francan tekston ol perceptis ĝian enhavon. Sed li jam koncentriĝis kaj legis :

“Patrujo bilancas !

En la proceso kontraŭ tiuj, kiuj kondukis Francujon en la jaro 1940 al la rando de la pereco, eksidis hodiaŭ sur la benko de la akuzatoj meĥanikisto Jean Daumal. Forta viro en la aĝo de kvindek jaroj kun klaraj okuloj kaj grizigantaj haroj li kondutas entute nature kaj trankvile. Iam kondutas tiamaniere homoj senkulpaj. Sed pli ofte ruzegaj friponoj, kiuj volas per sia trankvilo konfuzi la juĝistaron.

Jean Daumal estis antaŭ la milito gvidanto de la laborejo en unu armila fabrikejo proksime de Parizo. Li estis sperta fakano, se ni povas juĝi el liaj kelkaj patentoj por pliperfektigo kaj plirapidigo de fabrikado de pafiloj.

Antaŭ la eksplodo de la milito Jean Daumal sendis al la aviadministerio sian novan proponon por fabrikati specialajn aŭtomat-pafilojn por aeroplanoj. Lia propono estis trastudita, rifuzita kaj resendita. Per tio la tuta afero ŝajne estis finita.

Kiam oni komencis je la dua fronto, anglo-amerikanaj armeoj kaptis en Normandujo nedifektitajn germanajn aeroplanojn. Militaferaj

fakanoj trastudis ilin kaj ĉiuj estis mirigitaj de la unika konstruo de la ferdekaj aŭtomatpafiloj. Post fino de la milito estis trovitaj en unu aviadil-fabriko en Germanujo planoj por fabrikado de tiuj ĉi efikaj armiloj. La planoj estis fotografe multkopiitaj. Subskribo de la eltrovinto estis tute legebla—Jean Daumal.

La akuzo kulpigas Jean Daumal pri perfido de la patrujo. La afero estas tute klara: ofendita eltrovinto serĉis novajn vojojn. Kaj li trovis la plej malbonan.

Estas memkomprenebla, ke Jean Daumal defendas sin. Tion ja faras ĉiuj kunlaborintoj kaj perfiduloj. Je la demando, kion li povos diri pri sia eltrovaĵo, li respondis:

“La planojn mi forbruligis.”

“Kiam.”

“La tagon antaŭ la alveno de la Germanoj.”

“Kial vi ilin forbruligis?”

“Por ke ili ne falu en la manojn de la Germanoj.”

“Kaj kial vi tion faris tiom malfrue?”

“Neniu povis atendi, ke la Germanoj venos tiom baldaŭ.”

“Nu, tio estas vero,” konsentas juĝisto. Sed tuj li demandis denove: “Kaj kial vi ilin pli volonte ne kaŝis? Vi ja povis ilin ie enterigi.”

“Neniun kaŝejon mi opiniis sufiĉe sekura,” klarigas la akuzato. “Cetere, por Francujo la planoj estis tute senvaloraj, se ili estis rifuzitaj de la ministerio.”

“Pro tio vi transdonis ilin tien, kie ili povis havi ian valoron.”

“Sinjoro prezidanto, mi protestas kontraŭ tia agado!”

“Mi scias . . . ,” prezidanto de la juĝistaro svingas per la mano. “Viaspecaj homoj ĝenerale volas protesti. Neniun ili perfidis, neniun ili malutilis, pri nenio ili scias—eble vi volas, ke ni kreu la fabelon pri forbruligo de la planoj? Kiamaniere vi povus—kiel la eltrovinto—detru la verkon, pri kiu vi certe laboris tre longan tempon? Tio ja kontraŭstaras al ĉiuj aksiomoj de la sana racio. Ĉu vi povas tion klarigi?”

“Jes.”

“Kiamaniere?”

“Mi ne volis malutili Francujon, se la planoj falus en la malamikajn manojn.”

“Kaj ĉu ne per tio, ke vi ilin bruligus, ĉu ne per tio vi ĝin ja malutilus?”

“Ne. Mi konis la tutan procedon parkere.”

“Nu . . . Supozante, ke ni kredus je la vero de via aserto: Ĉu vi povus pruvi, ke vi forbruligis vian projekton?”

“Ne.”

“Nu, rigardu. Do vi ne havas atestanton?”

“Ne. Efektive—”

Ĉi tie Daumal eksilentis, sed la prezidanto lin tuj kuraĝigis:—

“Daŭrigu, mi petas! Efektive—?”

“Mi havis atestanton, sed li jam ne vivas.”

“Memkompreneble,” rimarkis glacie la prezidanto. “Gravaj atestantoj ofte ne vivas.”

“Mi havis atestanton,” persistis aserti Jean Daumal. “Mi forbruligis la paperojn post konferenco kun li. Li estis mia kunlaboranto, inĝeniero Marcel Payen.”

“Kia estis lia nomo?”

“Marcel Payen. Nobla homo. Honesta, pura karaktero—”

“La juĝistaro ne havas intereson pri viaj personaj impresoj,” interrompas Daumal-on la prezidanto. “Vi diris, ke la sola atestanto de via faro jam ne vivas. Ĉu vi povas diri al ni, kio okazis al li?”

“Kiam ni kuris el Parizo, li estis mortpafita.”

“De kiu?”

“De la germanaj aviadistoj.”

“Kiu diris tion al vi?”

“Mi mem tion vidis.”

La prezidanto demandis protokolistojn, ĉu ili ĉion notis. Poste li interrompis la kunsidon, en kiu oni daŭrigos morgaŭ.

La tuta proceso, en kiun estas miksitaj ankoraŭ kelkaj personoj, daŭros ĉirkaŭ ok tagojn.

Ni ne volas anktaŭkuri la okazantaĵojn, sed ĉio atestas pri tio, ke Daumal vere perfidis la patrujon. Ni ne dubas, ke la juĝistaro ankaŭ en tiu ĉi kazo progresos kun ĉiu necesa severeco. Pro tia perfido de la patrujo ekzistas nur unu speco de puno—la puno de morto. Nur per ekzempla malmoleco ni atingos tion, ke la katastrofo el la jaro 1940, kiam la “kvina kolono” kaŭzis kapitulacion de Francujo, neniam ripetiĝu.

Liberigita patrujo antaŭmetas siajn fakturojn. Kaj estas la tasko de niaj juĝistaroj, klopodi ke tiuj ĉi fakturoj estu pagataj ĝis la lasta cendo.”—

Tuj ĉe la unuaj linioj malaperis la senzorga rideto de sur la vizaĝo de la leganta viro. Kaj kiam li finlegis, li suprensaltis, la ĉifitan ĵurnalon li ŝovis en la poŝon kaj komencis maltrankvile marŝi tra la parko. Sur lia frunto troviĝis akraj sulkoj. De sur liaj lipoj deglitis duonlaŭtaj vortoj:

“Tio ne estas ebla! Tio ja ne estas ebla!”

Maljunaj homoj, sidantaj sur benketoj, kun intereso observis lian konduton. Ili ne komprenis, kio okazis ĉe tiu juna viro, kiu venis tien antaŭ momento kun ridetanta vizaĝo.

Ili eĉ ne povis tion kompreni. Ili ja ne sciis, ke antaŭ ili promenas—Marcel Payen.

daŭrigota.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 212

2an de Decembro 1948

NOVAJ DELEGITOJ

Brazilo

Cabo Frio. D : D. Pereira de Souza, Banco do Brasil.
Rio de Janeiro. D : N. Pereira de Souza, Caixa Postal 5117.

Britujo

Chorleywood (Herts.). D : A. C. Oliver, 120 Heronsgate Road.
Poole (Dorset). D : A. Fisher, 15 Whitecliff Crescent, Parkstone. Tel : Parkstone 2148.

Francujo

Orleans. D : P. Delaire, 2 Rue de Vauquois.
VD : R. Ligneaut, Rue d'Angleterre 5.

Germanujo

Bonn. D : E. Kind, Kirsch-Allee 5—II.
Geldern. D : M. Mollenhauer, Poŝtfako 4, (22a) Geldern (Rhld.)

Hungarujo

Orosháza. D : D-ro B. Szemenyei, Postafiók 91. Tel : 92.

Portugalujo

Lisboa. FD (Aŭtomobiloj) : H. Ferreira da Silva, Calçada da Estrela 231, 2, Dto. Tel : 47189.
Tramagal. D : M. Dores Mendes, Alto da fonte.

Svedujo

Färgelanda. FD (Fervojoj) : J. A. Hansson, Fack 43. Tel : 16.
Grums. D : G. Nordling, Fack 38. Tel : 60.

Usono

San Mateo (Calif.). D : S-ino C. L. Coss, 125 Chestnut Lane.

ŜANĜOJ

Britujo

Hull. D : vakas.

Francujo

Cannes. D : vakas

Germanujo

Forchheim. D : vakas.

Hungarujo

Mindszent. D : vakas.

Islando

Reykjavik. D : nova adreso : Hamrahlid 9.
FD (Korespondado) : vakas.

Jugoslavujo

Novisad. D : nova adreso : Ul. Jugoslovenske Armije 106.

Nederlando

Venlo. FD (Instruado ; lingvoj) : vakas.

Portugalujo

Agualva. D : vakas.
Lisboa. FD (Instruado) : vakas.
Tramagal. FD (Radio) : vakas.

Svedujo

Kungsbacka. FD (Fervojoj) : vakas.

Svisujo

Solothurn. D : vakas.

Usono

Rolla (Mo.) D : nova adreso : 400 Oak Street. Tel : 812-J.
San Carlos. D : vakas.

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la 30a de Novembro, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Novembro 1947 :

	1947	1948
Asociaj Membroj	8279	10938
Individuaj Membroj :		
MJ	1134	976
MA	5302	4529
MS	295	345
Patronoj	22	21
DM	151	172
HM	53	56
	6957	6099
	15236	17037

PATRONOJ 1949

1. D-ro F. J. Williams, Melbourne, Aŭstralio.
2. S-ro G. van der Lijn, Uccle, Belgujo.
3. S-ino J. M. Ravestein-Basters, Den Haag, Nederlando.
4. S-ro J. R. Grocott, Blackburn, Anglujo.
5. S-ro T. J. Gueritte, Surbiton, Anglujo.
6. S-ro R. F. Jervis, Slough, Anglujo.
7. S-ro D. Kennedy, Glasgow, Skotlando.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1949

1. S-ro G. Cettini, Claremont, Okc. Aŭstralio.
2. S-ro I. Kalmanowicz, Askersund, Svedujo.
3. F-ino A. F. Jobbins, Tunbridge Wells, Anglujo.
4. S-ro Saldanha Carreira, Lisboa, Portugalujo.
5. S-ro W. Heap, St. Annes-on-Sea, Anglujo.
6. S-ro G. H. Parker, London, Anglujo.
7. S-ro F. Thurgood, London, Anglujo.
8. S-ro J. R. Pfanner, Gandorhun, Sieraleono.
9. S-ro M. Lopes do Rego, Lisboa, Portugalujo.
10. S-ro L. Bemaldo, Lisboa, Portugalujo.
11. S-ro B. P. Blöndal, Hvammstanga, Islando.
12. S-ro W. Reinhold, Duisburg, Germanujo.
13. S-ro K. Jost, Zürich, Svisujo.
14. S-ro P. Le Brun, Kreuzlingen, Svisujo.
15. F-ino H. Monod, Morges, Svisujo.
16. S-ro S. T. Fuller, Brighton, Anglujo.
17. F-ino N. Hanson, Halifax, Anglujo.
18. S-ro R. Murray, Thorpe Bay, Anglujo.
19. S-ro M. Pearson, Sheffield, Anglujo.
20. S-ro H. K. Phelan, London, Anglujo.
21. S-ro M. Fernández Menéndez, Montevideo, Urugvajo.
22. D-ro Z. Vugrinec, Slav. Požega, Jugoslavujo.
23. S-ro A. Fisher, Parkstone, Anglujo.
24. S-ro A. Prince, Letchworth, Anglujo.
25. S-ro S. H. Larking, London, Anglujo.
26. S-ro H. W. Allen-Smith, Watford, Anglujo.
27. S-ro T. L. C. Bluett, London, Anglujo.
28. F-ino A. Fotherby, Surbiton, Anglujo.
29. S-ro C. C. Goldsmith, Rickmansworth, Anglujo.
30. S-ro W. P. Hanratty, London, Anglujo.
31. S-ro E. C. Hilder, Haverhill, Anglujo.
32. F-ino M. Jay, Bishop Auckland, Anglujo.
33. S-ro J. Lovell, Ruislip, Anglujo.
34. S-ro J. C. Rapley, London, Anglujo.
35. S-ro F. W. Shaw, Whitworth, Anglujo.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

S-ro H. Siegrist, Basel, Svisujo.

DONACO. H. T. Bailey 2ŝ. 6p.**Sinceran dankon al ĉiu helpanto.**CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario.***SERVA CENTRO KAJ REDAKCIO :** Palais Wilson, Genève, Svisujo.**Nova Jaro :** Okaze de Jarŝanĝo, la Redaktoro de *Esperanto* korege dankas al la bonvolaj kunlaborantoj kaj deziras al ĉiuj prosperan jaron.**Korespondado :** U.E.A. neniam invitis personojn, kiuj skribas pro iu ajn afero al Genève aŭ al Rickmansworth, ke ili aldonu respondkuponon por pagi la afrankon; nek al personoj, en landoj kie respondkuponoj ne estas aĉeteblaj, sendi poŝtmarkojn. La altigo de la poŝta tarifo en Svislando kaj la kreskanta korespondado de la Serva Centro tamen devigas, ke ni petu vin aldoni la afrankon por la respondo por malaltigi niajn kostojn. Por vi tio ne estas grava sumo, sed por ni ĝi ludas grandan rolon.**Interhelpo :** Ankaŭ dum la pasinta jaro ni sendis al aro da samideanoj meritantaĵojn tion pakajetojn kun kafo, enskatola lakto k.s. Ni kun bedaŭro devas konstati, ke nombro da tiaj sendaĵoj (valoro po 5 sv. fr.) destinitaj al la orienta zono de Germanujo, ne alvenis ĉe la adresitoj. Postulo pri repago ne utilas. Ni denove volas atentigi, ke ni ne povas sendi presaĵojn en tiun zonon.**Ŝlosiloj de U.E.A.** Ni atentigas, ke U.E.A. transdonas la rajton eldoni Ŝlosilojn al interesitaj organizaĵoj Esperantistaj. La eldonrajto apartenas al U.E.A. sole. Pri la kondiĉoj ricevi la licencon, informas la Serva Centro en Genevo.**Aperintaj Libroj :** Ni denove invitas eldonistojn, ke ili sendu ekzempleron de eldonitaj libroj al la Biblioteko de U.E.A. (adreso supre) por ke ili ne manku en la Bibliografio de nia literaturo. Verŝajne reaperos Bibliografia priskribo aŭ en la Jarlibro aŭ en la revuo de U.E.A.**Jubileo :** En la jarkonfin 1948 la nuna redaktoro de *Esperanto*, eksdirektoro de U.E.A., festis specialan jubileon: tiun de la 50-mila letero skribita de li (ne diktita) en Esperanto de la jaro 1914 (poŝtkartoj ne enkalkulitaj). La numeritaj duplikatoj de ĉiuj leteroj formas kvardek volumojn.HANS JAKOB, *Estrarano de U.E.A.***ENIGMA KONKURSO N-ro 34**

Solvojn sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, BRUSSEL-UCCLE, Belgujo.

Al ĉiu leganto mi deziras feliĉan kaj prosperan novjaron.

Solvoj de la enigmoj en Konkurso N-ro 32 :

N-ro 69 : Kia estas via laboro, tia estas via valoro. Ŝlosilvortoj : Katolika, interesi, aluminio, eksplodi, serpento, tabureto, aviadilo, sterledo, vakcinio, identeco, aerolito, limonado, arseniko, burleska, okulharo, relativa, oblikvan (en la teksto troviĝis preŝeraro: *kliniĝanta* anst. *kliniĝantan*), traktato, instanco, artiŝoko, eliksiro, sekurigo, telefono, atrepsio, stearino, varmiĝis,

izomorfa, aventuro, verdikto, apostato, lanterno, observas, redakcio, oksigeno.

N-ro 70 : Kiu prudenton ne havas, tiun saĝo ne savas. Ŝlosilvortoj : Klaki, inter, ulano, pilko, rento, utero, dalio, estro, nacio, tendo, orelo, nadlo, naski, ebura, haloo, avare, volbi, arkta, stano, tiaro, iriso, urego, neono (tiu vorto estas neebila; eraro mia), strio, astro, ĝiris, omaro, nervo, eriko, spato, aleno, verbo, ardeo, signo.

Por la novaj abonantoj mi ripetas, ke ĉiu abonanto povas partopreni la konkurson. Pro la sistemo, laŭ kiu la premioj estas asignataj, ĉiu, kiu regule ensendas la solvojn, siatempe ricevos premion. La gajnintoj mem rajtas elekti sian premion ĝis certa valoro.

Enigmo N-ro 73 : El la literoj de ĉiu paro da vortoj formu novan vorton. La komencliteroj de la novaj vortoj formas proverbon.

alta - krevi; revo - kato; tiom - penso;
 arbo - tute; karno - tiom; alia - ringo;
 tiom - areno; tio - karbo; kien - skolo;
 mito - pasi; ŝati - koro; bruna - tiom;
 tia - orelo; sino - gramo; kial - arda;
 armi - pego; orfa - gliti; turo - pano;
 lino - gasto; urno - male; sepio - peli;
 drogo - heni; kano - legi; ruzo - vito;
 krio - sama; tinko - pasi.

Enigmo N-ro 74 : Post Internacia Esperanto-Kongreso ses partoprenintoj kune vojaĝis hejmen en unuaklasa kupeo, kie ili okupis ĉiujn ses lokojn, tri kontraŭ tri. Ili estis profesoroj en kemio, fiziko, matematiko, zoologio, astronomio kaj medicino. Iliaj nomoj, ne en la sama vicordo, estis Karlsen, Nansen, Hansen, Jansen, Jensen kaj Svenson. Mi donas pri ili la sekvantajn detalojn :

- I : Ĉiu legas libron, verkitan de iu el la aliaj.
- II : Karlsen legas kemian artikolon.
- III : Svenson legas libron, verkitan de lia kontraŭa najbaro.
- IV : Jensen sidas inter la zoologo kaj la kemiisto.
- V : Flanke de Jansen sidas la medicinisto.
- VI : Astronomo kaj kemiisto sidas unu kontraŭ la alia.
- VII : Nansen legas medicinan libron.
- VIII : Karlsen sidas en angulo.
- IX : Karlsen ne estas astronomo.
- X : Nansen sidas kontraŭ fizikisto.
- XI : Jansen legas libron de la zoologo.
- XII : Hansen neniam legas matematikajn librojn.

Nun klopodu difini ĉies profesion.



**INFORMA
EDUKA
INTERESA**
kun multaj bildoj

FAKTOJ PRI DANLANDO

Unuaranga poŝformata konsultlibro kun granda provizo da informoj kaj sciindaĵoj pri la danaj popolo, lando, industrio, trafiko, komerco, administrado, edukado, kaj kun ilustrita "Kiu estas kiu?"

Prezo 3ŝ. 9p., afranko 3p.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo,

Ĉu vi jam legis la problem-romanon,

D-ro DORNER

de H. L. Egerrup ?

Se ne, aĉetu kaj legu ĝin nun!! Ĉie oni pridiskutas ĝiajn problemojn!! Partoprenu ankaŭ vi la pridiskuton!

"... la verko estas interesa kaj vigla... Nur fakulo estas kompetenta kritiki la scienca bazon de la verko... —*Esperanto Internacia*.

... La aŭtoro evidente posedas tute sufiĉan fantazieron de romanverkisto—eĉ pli ol sufiĉan—tiel streĉe kaj romantike li scias gvidi la temon...

... se la libro aperus en nacia traduko, ĝi certe estus al sia eldononto brila sukceso.—

Suomen Socialdemokratti.

Broŝ. 8 ŝil., afranko 6p.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Literatura Mondo

la bela literatura revuo en Esperanto.
Formato 29×20 cm. Aperas provizore
ĉiun duan monaton.

★

Jarabono 1949 : 15 anglaj ŝilingoj

★

Sendu vian abonon al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

LA LIBRO DE LA SPIRITOJ

"... bonege taŭgas por ĝustigi tiujn opiniojn kaj por forigi la miskomprenojn."—*Heroldo de Esperanto*.

"... Pri unu afero mi estas tre kontenta; la lingvo estas modela."

"... Mi senhezite diras, ke laŭ vidpunkto pure lingva ĉi tiu verko estas la plej kontentiga, kiun mi ĝis nun legis en Esperanto... la frazoj portas la stampon pri instruiteco kaj ŝato pri la plej ĝusta vorto por atingi la bezonatan nuancon... La rezulto estas libro pri kiu iu ajn literaturo povus esti fiera. Por la Esperanta ĝia valoro estas netaksebla..."—*Esperanto Internacia*.

531 paĝoj, 19×14 cm., broŝ. 10ŝ. 6p.,
tole bind. 12ŝ. 9p., duonlede bind. 25ŝ. 6p.,
afranko 9p.

Mendu ĉe U.E.A.

ALLOGAJ LIBROJ

Streĉita Kordo. K. Kalocsay	broŝ. 7 ŝil.
Tragedio de l'Homo. E. Madách (K. Kalocsay) ..	broŝ. 6 ŝil.
Infero. Dante (K. Kalocsay) ..	broŝ. 11ŝ. 6p. bind. 14ŝ. 6p.
Arthistorio. K. Kalocsay	broŝ. 16ŝ. 6p.
Parnasa Gvidlibro. Kalocsay kaj Waringhien ..	broŝ. 6 ŝil.
Enciklopedio de Esperanto. Bleier, Kókény, Ŝirjaev. Sen ilustraĵoj	broŝ. 32ŝ. 6p.
De Paĝo al Paĝo. L. Tárkony ..	bind. 6ŝ. 9p.
Dekdu Poetoj. K. Kalocsay	bind. 6ŝ. 9p.
Fine mi komprenas la radion. E. Aisberg	broŝ. 8 ŝil.
Verkaro de Fez. E. Wiesenfeld	broŝ. 11ŝ. 6p.
Rigardu la Teron. Van Loon (Saville) ..	broŝ. 23 ŝil.
Arĝenta Duopo. Kalocsay kaj Baghy ..	broŝ. 7ŝ. 6p.
Svisa Antologio. A. Baur ..	broŝ. 23 ŝil. bind. 26ŝ. 6p.
Rimportretoj. K. Kalocsay ..	broŝ. 2ŝ. 6p.
La Sorĉistino el Kastilio. Ásch (Lejzerovicz)	broŝ. 5ŝ. 6p.
Pri l'Moderna Arto. Grenkamp-Bzrekowski	bind. 6 ŝil.
La Juda Ŝtato. Herzl (Selzer)	broŝ. 5 ŝil.
Auli. H. Adamson ..	broŝ. 3ŝ. 6p.
El la verda biblio. I. Lejzerovicz	broŝ. 2ŝ. 6p.
Tri homoj en boato. J. K. Jerome (Badash)	bind. 10ŝ. 6p.

Aldonu 10% por afranko.

Eldonitaj de
LITERATURA MONDO, Budapest

Mendu ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo